



Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

MondaFest' • La Monda Festivalo de Esperanto • 20 junio – 20 septembro

Festivala Kuriero

18-a de septembro 2020, numero 18

Redaktas Dmitrij Ševčenko kaj Anna Striganova

La 8-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj. Rezultoj.



Eŭropa Festivalo
de Esperantaj Kantoj

Europejski Festiwal Piosenki Esperanckiej

Europejskie
Centrum
Edukacji
Międzykulturowej



ilei



Wrocław miasto spotkań

VROCLAVO urbo de renkontiĝoj

Honora Patronado de la Prezidanto de Vroclavo

Ĉi-jare estis tri kategorioj: koruso aŭ ensemblo, solisto, registrita en studio. La aĝkategorioj estis la samaj: 0-18 jaroj / 19-54 jaroj / 55-111 jaroj. Sufiĉis **kanti nur unu kanton en Esperanto**.

La ĉefpremio

SE VI VOLAS KOLERI / KONRAD ORAWSKI / Pollando
vortoj – Kálmán Kalocsay, muziko – Konrad Orawski

Speciala premio pro muzika akompanado

KIEN VI IROS? / RAFAEL MILHOMEM / Brazilo
vortoj – Rafael Milhomem, muziko – Rafael Milhomem

JARO DE L' VIRUSO / I.D.C. / Francio
vortoj – Eric Languillat, muziko – Eric Languillat

Aĝkategorio 0-18

Solisto

la 2-a loko

HELLO (de Adele) / OLIWIA MACIEJEWSKA / Pollando
vortoj – Cristina Casella, muziko – Cristina Casella, tradukado – Anselmo Forlenza

Ensemblo

la 2-a loko

LA TUBOJ (de Kajto) / GRUPO I
vortoj – Ŝtefo Urban, muziko – Nanne Kalma

Speciala distingo por MÓNIKA MOLNÁR pro preparado de la ensemblo GRUPO I

Aĝkategorio 19-54

Solisto

la 1-a loko

PYTASZ MNIE / WOJCIECH ŁAWNİKOWICZ / Pollando
aŭtoro – Andrzej Rosiewicz, tradukado – Andrzej Kraśzewski

la 3-a loko

KANTIKO DE MOSEO / MIĤAELO RIKARDO BALICKI / Pollando

vortoj – el la Libro de Eliro (z Księgi Wyjścia) ĉapitro 15 (rozdział 15), muziko – mel. tradicia franca aranĝo de Gilles Desrochers, pola aranĝo de Jacek Gałuszka, Esperanta aranĝo de Miĥaelo Rikardo Balicki

Ensemblo

la 1-a loko

INDIĜENA ROMANCO / LUIS KAJ JAHIR / Kolombio
vortoj – Luis Obando, muziko – Luis A. Diago Montilla

la 2-a loko

PASU L' AKVON / ANNA SZCZYPEK KAJ MIĤAELO RIKARDO BALICKI / Pollando

vortoj – aŭtoro nekonata / autor neznany, 16-a jarcento (el la kantolibro "Ciancionero Musical de Palacio"), tekstos surbaze de la Esperanta traduko fare de Saskia Idzerda.

la 3-a loko

SERENADA (de Franciszek Schubert) / PAWEŁ I WŁADEK 2 / Pollando

muziko – Franciszek Schubert, tradukado – Neven Mrzlečki



Aĝkategorio 55-111

Solisto

la 2-a loko

AMIKA RONDO / GAFUR MIRZO / Uzbekio
vortoj – Julio Baghy, muziko – Gafur Mirzo

la 3-a loko

NUN SAMIDEANOJ / IVÁN MATTIG CATALÁN / Ĉilio
vortoj – Iván Mattig Catalán, muziko – André Joubert

Koruso

la 1-a loko

GLORO / KORUSO DE ESPERANTO-POPULARIGA
ASOCIO / Japanio
vortoj – DEGUĈI Onisaburo, la kunfondinto de Oomoto,
muziko – NOMURA Joŝio, tradukado – MAEDA Ŝigeki

la 3-a loko

MIL KOLOMBOJ / INTERKANT' / Francio
aŭtoroj – E. Marnay kaj C. Bruhn

la 3-a loko

LA FLAMO DE AMO DE PACO / La FÖNIX / Hungario
vortoj – Mária Erzsébet Eszes, muziko – Edita Ŝiroki

En studio

Solisto

la 1-a loko

SE VI VOLAS KOLERI / KONRAD ORAWSKI / Pollando
vortoj – Kálmán Kalocsay, muziko – Konrad Orawski

la 2-a loko

KIEN VI IROS / RAFAEL MILHOMEM / Brazilo
vortoj – Rafael Milhomem, muziko – Rafael Milhomem

la 3-a loko

LA JARO DE L' VIRUSO / I.D.C / Francio
vortoj – Eric Languillat, muziko – Eric Languillat

la 3-a loko

LA LAMENTO DE LA TERO / EMANUELE ROVERE / Italio
vortoj – Emanuele Revere, muziko – Emanuele Revere

Ensemblo

la 1-a loko

KAŜIRI / BAROK-PROJEKTO / Brazilo
vortoj – Rafael Milhomem kaj Muniz, muziko – Rafael
Milhomem kaj Muniz

Heidi Goes pri lastatempa Esperanto-agado en Angolo

Unu el niaj plej elstaraj aktivuloj, i.a. gajnintino de la Premio Deguĉi en 2019 – prezentis sian agadon por Esperanto en Angolo, kun aparta fokuso pri la provinco Kabindo.

Klerige: Heidi Goes pri lastatempa Esperanto-agado en Angolo – Plia rendevuo kadre de la serio “Klerige”, sub la kunordigo de Claude Nourmont, komisiito de UEA pri Kulturo.

Ekde 2015 Heidi Goes vizitis ses fojojn Angolon por siaj doktorigaj esploroj. Ŝia esplortero estis precipe Kabindo, ekssklava provinco de Angolo inter Kongo Kinŝaso kaj Kongo Brazavilo. En 2018 ŝi sukcesis, post prelego pri alia temo, paroleti pri Esperanto al mezlernejoj kaj en 2019 ŝi enkondukis Esperanton en la sama mezlernejo kaj en apuda

Luanda ŝi renkontis kelkajn esperantistojn kaj ŝi parolis interalie al la nova belga ambasadoro en Angolo pri Esperanto. Kune kun Abel Massiala el Kabindo ŝi transdonis *Brulo kaj Ritmo*, la tradukitan poemaron de la unua prezidento de Angolo, Agostinho Neto, al la Memormuzeo António Agostinho Neto.

Spektu ĉe la jutubkanalo de UEA, UEAviva! – https://youtu.be/_WMooUHGStk.

Ĉiutage venas plia filmo, filmeto, programero de VEKI!



Iru al la jutub-kanalo de ILEI, kie vi povas spekti la programerojn de VEKI.

Esperanto+Edukado ILEI:

<https://www.youtube.com/c/EsperantoEdukadoILEI/>

Ĉar VEKI daŭris 7 tagojn, ĉar ĉiu tago enhavis 12 horojn da elsendado, temas pri proksimume 80 programeroj. Jam nun aperas la unuaj, kaj la plusendado daŭros ĝis la 15-a de novembro. Do iru al la paĝo kaj abonu ĝin.

Tiu paĝo enhavas ankaŭ novaĵojn pri ILEI kaj filmojn pri pedagogio kaj lingvolernado. Do ne malhavebla ilo por vi!



lernejo por ontaj instruistoj (en Landana). Ŝi ankaŭ dancigis plurajn grupojn de infanoj ĉe Esperanto-muziko, en Landana kaj Necuto. En la ĉefurbo



[Gazetara Komunikado de UEA N-ro 907]
**Premio 2020 de Fondaĵo
Antoni Grabowski
al Bertilo Wennergren**

Legu la intervjuon kun Bertilo Wennergren en la oktobra numero de la revuo *Esperanto*.



SES, Martin 2013, Foto: A. Sochacki

La Fondaĵo Antoni Grabowski (FAG) estis kreita sur la bazo de grandanima donaco de Adam Goralski (1912–2005). Ĝia **regularo** estis novformulita en 2017. La fondaĵo, portanta la nomon de “la patro de la Esperanta poezio” Antoni Grabowski, celas subteni la Esperantan kulturon per premioj kaj subvencioj. La Juĝkomisiono de FAG, kiu de 1984 aljuĝas premiojn ĉiun duan aŭ trian jaron, nun konsistas el Jesper Lykke Jacobsen, István Ertl kaj Mariana Evlogieva. La administradon de la Fondaĵo prizorgas la Centra Oficejo de UEA.

Kadre de la Monda Festivalo de Esperanto (MondaFest’ 2020) ni sciigas per tiu ĉi komunikado la ĉi-jaran premion de Fondaĵo Antoni Grabowski.

La unua (kaj sola) premio (800 usonaj dolaroj) iras al Bertilo Wennergren (Svedio/Germanio). Li ricevas ĝin pro siaj elstaraj kontribuoj al esperantologio. Per sia *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko*, kiu en sia reta versio (bertilow.com/pmeg) staras jam en la 15-a versio, li kreis novan referencon por priskribi Esperanta gramatiko. Uzante novigan, simplan terminologion kaj abundajn ekzemplojn el kvalitaj fontoj, tiu verko klarigas al komencantoj kaj al specialistoj ĉiujn aspektojn de la Esperantogramatiko. Wennergren krome kreis la retpaĝon Tekstaro (tekstaro.com), kiu ebligas la traserĉon kaj komparon de vasta literatura kaj gazetara tekstaro de pli ol 10 milionoj da vortoj. Temas pri grava ilo por la analizo de la efektiva lingvouzo kaj ĝia evoluo. Akademiano de 2001, Wennergren deĵoris kiel direktoro de la sekcioj pri Gramatiko kaj pri la Ĝenerala Vortaro. En tiu lasta funkcio li iniciatis kaj subskribis la 9-an Oficialan Aldonon al la Universala Vortaro en 2007.

Tago de Veteranoj (19/sept 14:00 UTC): Eduardo Vivancos – Centjariĝo de Esperanta legendo (prezentas Xavi Alcalde)

■ Fernando Maia Jr.

“En Esperantujo oni ofte parolas pri junuloj, sed ni ne forgesu la maljunulojn, kiuj konstruis la movadon kaj komunumon, kiujn ni ĝuas hodiaŭ”, skribis antaŭ kelkaj jaroj nia karmemora Mateo Chisolm, el Toronto, pri Eduardo Vivancos (foje esperantigita Vivankos). Eduardo estis honorita pro elstara agado dum la ferma ceremonio de la UK en Seulo 2017. Naskiĝinta en Barcelono la 19-an de septembro 1920, Eduardo Vivancos estas esperantisto ekde la 1930-aj jaroj. Li partoprenis la Hispanan militon (1936-39) kaj eĉ instruis Esperanton al siaj kamaradoj en la fronto. Ĝis antaŭnelonge Eduardo havis mirinde firman memoron kaj senlimajn rakontojn pri la milito kaj la posta ekziliĝo en la koncentrejoj en Francio, antaŭ sia translokiĝo al Toronto en 1954, kie li motoris la lokan movadon dum jardekoj. Venu lerni pri lia eksterordinara vivo kaj kunfesti lian centjariĝon kun Javier “Xavi” Alcalde, kiu verkas lian biografion.



**EDUARDO VIVANCOS:
CENTJARIĜO DE
ESPERANTA LEGENDO**

PREZENTAS:
Xavi Alcalde

19-AN DE SEPTEMBRO 2020
TAGO DE VETERANOJ

La prezento de Xavi okazas en la 19-a de septembro, deklarita de la Monda Festivalo de Esperanto por fariĝi la Tago de Veteranoj kaj esperinde inaŭguri ĉiujaran honorigon de grandaj veteranoj de nia movado tutmonde. La prezenton de Xavi eblos sekvi realtempe per la jutubkanalo de UEA, UEA viva: <https://www.youtube.com/UEAviva>



#Mondafest2020 Klerige: Thomas Bormann pri rifuĝintoj en Grekio

Tiu ĉi rendezuo, la 17-an de septembro, kadre de la serio “Klerige”, sub la kunordigo de Claude Nourmont, komisiito de UEA pri Kulturo, fokusiĝis pri la urĝe solvenda nuntempa migradkrizo en Grekio, priraportita el ĵurnalista vidpunkto.

Daŭre miloj da rifuĝintoj restas senhejmaj sur la greka insulo Lesbos, ĉar pasintan semajnon forbrulis la rifuĝintejo *Moria* sur tiu insulo. Ĝi estis la plej granda rifuĝintejo en Eŭropo. Ĉirkaŭ 13 000 homoj, ĉefe el Afganio, vivis en tiu rifuĝintejo – en tre malbonaj kondiĉoj. Nun tiuj homoj vivas surstrate, ĝis provizora, nova rifuĝintejo estos finkonstruita sur la insulo Lesbos.

La fifama rifuĝintejo *Moria* estis parto de la Eŭropa sistemo por kontroli enmigradon: ĉiuj rifuĝintoj, kiuj venis per etaj boatoj de la turka marbordo al la proksime situanta greka insulo Lesbos, estis senditaj en tiun rifuĝejon. Ili ne rajtas forlasi la insulon, ĝis estas decidite, ĉu ili ricevas azilon en Eŭropo aŭ ne. *Moria* havis lokon por 2 800 personoj. Komence de tiu ĉi jaro pli ol 20 000 homoj devis vivi en la rifuĝintejo, t.e. sep foje ĝia kapacito. En la pasintaj monatoj multaj rifuĝintoj povis forlasi la rifuĝintejon *Moria*, sed daŭre 13 000 personoj vivis tie dum la incendio. Neniu mortis pro la fajro, estis kelkaj vunditoj.

Pro la vivkondiĉoj en *Moria* Eŭropa Unio devas honti. Nun la registaroj de la EU-Ŝtatoj diskutas kiel nov-organizi la rifuĝintejon sur la insulo Lesbos kaj la membroŝtatoj de Eŭropa Unio disputas kiel dividi la rifuĝintojn. Grekio plendas, ke apenaŭ iu alia EU-Ŝtato pretas transpreni rifuĝintojn de Grekio. La rifuĝintoj alvenas en Eŭropon unue al Grekio, ĉar ĝi situas ĉe la limo de Eŭropa Unio.

Eŭropa Unio krome diskutas, kiel trakti la problemon de internacia migrado. Rapida solvo estas malverŝajna. Tial provizore miloj da rifuĝintoj devos resti sur la Grekaj insuloj.



Thomas Bormann, ĵurnalisto kaj korespondanto pri Grekio por la Germana Radio-reto ARD, loĝas en la greka ĉefurbo Ateno. Pasintan semajnon li estis sur la insulo Lesbos por raporti en radio kaj televido pri la incendio en *Moria* kaj pri la sekvoj por la rifuĝintoj.

Certe kaj kutime vi povas spekti la prelegon ĉe UEAViva:

<https://www.youtube.com/watch?v=OoftXMZgivs>

Kunpens(ig)ado: Esperanto kaj universitatoj (la 8-a sesio)*

*De Internaciaj Korespondaj
Esperanto-Universitatoj ĝis Internaciaj Virtualaj
Esperanto-Universitatoj – Ĉu Ĉio nur Fantazio?
Kial ne Okazas Io?*

La registritajn filmojn de la 7 antaŭaj sesioj, kun partopreno de ĉ. 40 samideanoj kaj kontribuoj de i.a. profesoroj Ilona Koutny, Nina Daniljuk, Humphrey Tonkin, Renato Corsetti, Orlando Raola, Dennis Keefe, Vincente Manzano-Arrondo kaj Amri Wandel kaj la aliaj, vi povas spekti en:

<https://www.espero.ir/eo/category/kunpensigado/>.

La 8-a sesio okazos lunde, la 21-an de septembro 2020 je la 14:30 laŭ UTC (karaj kolegoj, bonvolu atenti pri la horo en via lando rilate al la UTC-horo. Nia la 8-a Kunpensigado pri Esperanto en universitatoj okazos, kiel ni anoncis, je la 14:30 laŭ UTC, la 21-an de septembro. Se vi loĝas en lando, kie la somera tempo ne ŝanĝiĝas, vi devas fari nenion apartan. Se vi loĝas en landoj, kie la horo ŝanĝiĝas, kaj Irano estas unu el tiuj landoj, bonvolu kontroli la horon en via lando).



Pliajn informojn vi povas trovi en Eventa Servo:
<https://eventaservo.org/e/afef2a>.

*MondaFest' neniam finiĝos :) IREA daŭre okazigas la renkontiĝojn pri Esperanto kaj universitatoj (*Red.*)

Vi povas esti aŭtoro de la *Festivala Kuriero* kaj la *Reta Revuo*! Por kontribui, skribu al la redakcio
redakcio@revuoesperanto.org

